

# La Salette

La bitoj ilustras artikolon sur paĝo 20

La loko de la apero

# DIA REGNO

ISSN 0167-9554

# DIA REGNO

• dumonata kristana revuo en esperanto • n-ro 1 (892) • 2012 •

Kandela procesio



## KELI

**Kristana Esperantista Ligo Internacia**  
fondita en 1911, neneŭtrala kunlaboranta kun UEA

**Celo:** *Krei efikan kontakton inter kristanoj el diversaj landoj kaj per Esperanto diskonigi la Evangelion pri Jesuo Kristo.*

**Prezidanto:** Philippe COUSSON

✉ 26 rue de Pré-Ventenet,  
FR 86340 Nouaillé-Maupertuis, Francio;  
☎ +33 (0) 549468021; ✉ keli@chez.com

**Sekretario:** Pavel POLNICKÝ;

✉ Na Vinici 110/10,  
CZ 290 01 Poděbrady II, Ĉeĥio  
☎ +420 325 615 651; ✉ polnicky@quick.cz

**Kasisto:** Ágnes RÁCZKEVY-EÖTVÖS

✉ Klauzál utca 32,  
HU 1072 Budapest, Hungario  
☎ +36 302 000 306;  
✉ agnes@raczkevy-eotvos.com

**Kotizoj:** Rekta membro kun gazeto, minimume €20,- • Membro-subtenanto €30,- • Nura abono: pagante rekte al KELI €16,- • pagante al Libroservo €18,- • Sendoj de okcidentaj monbiletoj per registrita letero al la kasisto de KELI. •

Se estas en via lando UEA-poŝtĝirkonto (informiĝu ĉe UEA) bonvolu prefere pagi al UEA por konto **kelk-p** de KELI • Franca bankkonto de 'KELI Ligue Chrétienne Espérantiste Internationale':

CIC-banko, BIC: CMCIFRPP;  
IBAN: FR76 1009 6182 4800 0368 7480 104

Vizitu ankaŭ la tt-paĝon [www.chez.com/keli/](http://www.chez.com/keli/)

## DIA REGNO

**Oficiala organo de KELI, fondita en 1908**  
dumonata revuo - ISSN 0167-9554

**Redaktoro:** Bengt Olof ÅRADSSON

✉ Västergårdsg 15; 256 64 Helsingborg; Svedio;  
☎ +46 70 2004574; ✉ dr\_board@yahoo.se

**Kontrollegis:** Éva FARKAS -TATÁR

Abonprezo sen membreco en KELI: €16,- aŭ egalvalora. Abonoj kaj anonckostoj pagotaj al la kasisto de KELI (vidu supre).

*Pri la enhavo de la artikoloj respondecas nur la aŭtoroj. Represo kaj traduko permesataj, kondiĉe ke oni citas la fonton. Specimenon kun represo aŭ traduko oni sendu al la redaktoro.*

**Ekspedado:** Pavel POLNICKÝ

Vidu la adreson de la sekretario

**Presado:** Tiskárna ASTROprint s.r.o., Poděbrady, Ĉeĥio  
✉ info@astroprint.cz

**Eldonmonatoj:** meze de feb, apr, jun, sep, okt, dec. <sup>g4pr</sup>

## ENHAVO

El la ekumena paroldiservo dum UK en Kopenhago	3
Kristana fakkunsido dum la UK	6
La mistiko de la apostolo Paŭlo	7
Listo de partoprenontoj	8
Temo por la KELI-kongreso	9
Al teologoj, pastroj, pastoroj ...	10
Ni najbaroj en Eŭropo	11
Ĉevaletto gvidas homojn al misiisto	16
Henk de Hoog - Andreo Cseh 3	18
La Salette	20
Informetoj	22
Je l'nova jar'	24

## REDAKTORAJ VORTOJ

**K**omencante novan redaktan jaron, mi denove volas danki ĉiujn, kiuj kontribuas al la riĉeco de nia gazeto. Sen tiuj kontribuoj mi ne sukcesus krei tian varian kaj interesan gazeton.

Ĉi-numere la temo en la artikoloj iel ĉirkaŭas rilatojn – rilatojn inter homoj aŭ nian rilaton kun Dio. Ni homoj ne travivas, almenaŭ ne emocie, sen funkciantaj rilatoj. Rilato kun iu estas baza kondiĉo de nia vivo. Konstante ni devas gardi niajn rilatojn kaj zorgu pri ili.

Eĉ la kongresa partoprenlisto, laŭ mi, montras nian bezonon kaj emon pri rilatoj. Ĉi-rilate kun geamikoj kiuj havas la samajn bazajn valorojn. Alie ni certe ne aliĝus tiom-grade al la kongreso.

Nia somera kongreso en Zöblitz jam logis multajn partoprenantojn. Se vi ankoraŭ ne aliĝis al la kongreso, sed tamen volas partopreni, mi proponas ke vi tu kontaktu nian sekretarion. ☞

# El la ekumena paroldiservo okaze de la 96-a Universala Kongreso de Esperanto en Kopenhago

Celebris kune Leif Nordenstorm, Gerrit Berveling kaj Peter Knauer la 24-an de julio 2011, en la katedralo “Vor Frue”

*Kaj unu el la skribistoj alvenis kaj aŭskultis la diskutadon, kaj rimarkis, ke li lerte respondas al ili; kaj tiu demandis lin: Kiu ordono estas la unua el ĉiuj? Kaj Jesuo respondis: La unua estas: Aŭskultu, ho Izrael! la Eternulo, nia Dio, la Eternulo estas unu; kaj amu la Eternulon, vian Dion, per via tuta koro kaj per via tuta animo kaj per via tuta menso kaj per via tuta forto. Kaj jen estas la dua: Amu vian proksimulon kiel vin mem. Pli granda ol ĉi tiuj ne estas alia ordono. Kaj respondis al li la skribisto: Bone, Majstro, laŭ vero vi respondis, ke Li estas unu, kaj ne ekzistas alia krom Li; kaj ami Lin per la tuta koro kaj per la tuta intelekto kaj per la tuta forto, kaj ami sian proksimulon kiel sin mem – tio multe pli valoras, ol ĉiuj bruloferoj kaj pekoferoj. Kaj Jesuo, vidante, ke li respondis prudente, diris al li: Vi ne estas malproksime de la regno de Dio. Kaj neniu plu kuraĝis fari al li demandon..*

El la evangelio laŭ Marko (12,28-34)

Pri tiu-ĉi evangelio dialogis Gerrit Berveling kaj Peter Knauer. La lasta parto de tiu-ĉi dialogo estis la sekvanta; la parto de Gerrit Berveling venas tie-ĉi nur pli aŭ malpli memore kaj en krampoj, kaj mi (P.K.) ne povas garantii la ekzaktecon de mia redono.

**K**araj gekredantoj: La temo de tiu-ĉi kongreso estas la dialogo. Ankaŭ nia evangelio parolas pri dialogo.

En la evangelio paralela de sankta Luko, kie poste Jesuo rakontas la parabolon de la bona Samaritano, la skribisto priskribiĝas iom de ekstere kaj kun malkonfido. Luko eĉ diras ke la skribisto volis “tenti” Jesuon.

Sed tie-ĉi en la evangelio de Marko

la sama skribisto priskribiĝas kvazaŭ kun empatio kaj de interne.

*[Tie-ĉi Gerrit Berveling demandis, ĉu estas utile kompari tiajn kvazaŭ-paralelajn rakontojn? Kion oni povas lerni el tio?]*

Estas ĉiam tre helpeme vidi saman aferon de diversaj flankoj kiuj apartenas

al la sama realo.

Mi pensas nun ke la teksto de tiu-ĉi evangelio estas *ekzemplo de vere sukcesa dialogo en kvar aktoj*.

La dialogo estas necesa por koni la veran opinion de aliaj personoj, anstataŭ atribui al ili opiniojn kiun ili ne havas. La lasta estas tre ofte la bazo de konfliktoj.

*[Gerrit Berveling: Ankaŭ en interekleziaj renkontiĝoj povas okazi problemoj pro tio, ke oni kvazaŭ aŭtomate anticipu jam estas konvinkita pri tio, kion nepre diras / pensas / opinias la alia ...*

*Same ĉe interreligiaj renkontiĝoj.]*

Nia dialogo tie-ĉi komenciĝas kun iu demando: Kiu estas la ĉefa ordono? La ĉefa ordono eble ne nur en la senco de la plej grava inter aliaj ordonoj malpli gravaj, sed en la senco ke la aliaj ordonoj estas resumitaj en ĝi. Tiu demando estas la unua akto de nia dialogo. La skribisto ŝajnas sincere voli scii kion Jesuo pensas.

*[Gerrit Berveling: Ni ja tiel facile emas transiri al la sekva paragrafo, ĉar tiun ĉi tekston ni jam konas – sed ni mem, se sincere ni pensas: Kio estas por mi la plej grava ordono? – Mi ne povas preterpasi la eblecon iom ludi per la lingvo: ordonoj de Dio – kio estas? Ĉu ni povas pensi pri la Dek Ordonoj – vi ja scias, ĉu ne: Vi ne ŝtelos / vi ne murdos / vi ne ... ktp. – kio estas?*

*Kie oni trovas ilin? Ĉu ne en Genezo kaj en Readmono?*

*Jes – certe. Kaj kio estas la rakontada strukturo de la ĉapitroj kiuj ĉirkaŭas ilin? Vojaĝado tra la dezerto ek al la Promesita Lando. Kaj kio do estas tiuj Ordonoj de Dio? Kio alia ol Vojmontriloj tra tiu dezerto kiu tiel ofte estas la homa vivo. ...*

*La Ordonoj de Dio ĉiam estas valoraj – do: oraj donacoj – do: donoj ... kiuj montras kiudirekten strebu iri al la Promesita Lando.]*

Jes, la or-donoj estas oraj donacoj, kaj la skribisto demandis pri ili.

La dua akto estas nun la respondo de Jesuo.

Jesuo nur citas la Bibliion de la judoj, kiun ni kristanoj nomas la Malnova Testamento.

*[Gerrit Berveling: La Nova ankoraŭ ne ekzistis – Jesuo simple citas la Bibliion.]*

Jes, la Malnova Testamento estas unue la Biblio de la judoj, sed nun jam legita per kristanaj okuloj.

Jesuo diras en sia respondo al la demando de la skribisto: La ĉefa ordono estas ami Dion el ĉiuj niaj fortoj. Kaj ekzistas dua ordono kiu apartenas al la ĉefa ordono: Ami nian proksimulon kiel nin mem. Mi revenos al la du ordonoj kaj ilia signifo.

*[Gerrit Berveling: Mi atendas.]*

La tria akto estas tre grava kaj necesa. Ĉu la skribisto komprenis la respondon de Jesuo? Kiel kontroli tion?

La skribisto ripetas la respondon de Jesuo, sed absolute ne tute laŭvorte, sed kun siaj propraj vortoj. Ĉar se li ripetus nur la samajn vortojn oni ne sciус ĉu la skribisto vere komprenis Jesuon. Oni sciус nur ke li havas bonan memor-kapablon. Sed nur se la skribisto ripetas la respondon de Jesuo per siaj propraj vortoj, tiukaze oni povas juĝi ĉu li komprenis la respondon de Jesuo aŭ ne.

Kaj la *kvara akto*? Eble la skribisto mem volas kompreni bone kaj eĉ pensas ke li komprenis Jesuon. Ĉu li pravас? Ne sufiĉas ke li mem pensas ke li komprenas bone. Kio do pli necesas?

Kaj tio estas la kvara akto: Jesuo mem konfirmas ke li sentas sin bone komprenita. Li pensas ke la ripeto de liaj paroloj fare de la skribisto per siaj propraj vortoj estis tre kompreneblaj. Eĉ se eventuale la skribisto ankoraŭ ne vivus laŭ tiuj-ĉi ordonoj, almenaŭ li vere sciас kiu estas la ĉefa duobla ordono. Nun ni povas esti certaj: La dialogo sukcesis.

Sed nun mi revenas al la *duobla ordono* mem.

Oni povas unue demandi sin: *Kiel agi por ami Dion?*

Mi pensas ke ami Dion estas la sama kiel vere konfidi al la amo de Dio por ni. Ni ne povas honori Dion pli ol en la konfido al lia parolo, kiu diras al ni nian komunecon kun Dio. Ni ne povas honori Dion pli ol en la konfido al lia amo senfina. Tia estas nia kredo: Kredi en Jesuo signifas ke baze de lia parolo ni estas certaj ke Dio la Patro amas nin en la sama kaj identa amo en kiu li amas sian propran Filon ekde la tuta eterno. Dio ne havas alian amon. La amo inter la Patro kaj la Filo estas la Sankta Spirito. La Filo enkarniĝis por povi diri al ni en homa parolo, ke ni estas amitaj, amataj kaj amotaj kun la sama amo en kiu li estas amata ekde la tuta eterno.

Kaj mi pensas ke *la dua parto de la duobla ordono* estas nur kiel la natura frukto de la unua parto. Se mi sciас min mem amata de Dio, mi jam ne vivas sub la forto de timo pri mia propra vivo. Mi estas libera por ami mian proksimulon.

Sed kion signifas ami mian proksimulon “kiel min mem”? Mi tre ofte

Diservo en Vor Frues kirke en Kopenhago



aŭdis ke tio signifus: Ni devas unue ami nin mem, kaj en la grado en kiu ni amas nin mem, ni devas ami ankaŭ niajn proksimulojn. Sed tio signifus: Se ni estas rigoraĵ pri ni mem, ni povus esti rigoraĵ ankaŭ pri la aliaj. Aŭ se ekzemple mi ŝatas griaĵon, mi rajtas altrudi griaĵon al la aliaj homoj.

Mi ne pensas ke tio estas la bona interpreto. Ami la proksimulon kiel min mem signifas prefere ke mi povas havi empaton. Se mi estus en la situacio de la alia (kaj ne la alia en mia situacio), kion mi dezirus ke oni faru al mi?

Kaj mi pensas ke tio estas la resumo de la tuta saĝeco: Ĝojo dividita, duobla ĝojo, sufero dividita duona sufero. Kaj

ami Dion, tio estas plene konfidi al lia amo por ni kiu liberigas nin por povi vere ami unu la alian.

Do mi povas memori: Ami Dion signifas konfidi al lia amo anstataŭ vivi sub la timo pri si mem. Ni estas amataj en la sama amo en kiu Dio la Patro amas sian Filon ekde la tuta eterno. Kaj tio liberigas nin por vere ami nian proksimulon. Tia amo estas la frukto de la fido. Eĉ se iu ankoraŭ ne konas Jesuon sed vivas en amo al siaj proksimuloj, li jam vivas en la Spirito de Jesuo kaj sub la graco de Dio.


Amen



## Kristana fakkunsido dum la Universala Kongreso en Kopenhago 2012

**K**iel kutime ni (KELI kaj IKUE) havis eblecon organizi fakkunsidejon dum la Universala Kongreso de UEA. Ĝin gvidis Bengt Olof Åradsson.

Ĉirkaŭ kvindeko da kongresanoj partoprenis kaj aŭskultis Gerrit Berveling paroli pri siaj bibliaj tradukoj, Leif Nordenstorm pri sia nova projektideo – libro pri krucoj kaj Éva Farkas-Tatár, kiu partoprenis sian unuan UK antaŭ 1962, ankaŭ tiam en Kopenhago. Tiel ŝi bone reprezentas la duan duonon de nia 100 jara KELI-historio.



Gerrit Berveling desegnas krucon sur papero kiun Leif Nordenstorm altetenas.

# La mistiko de la apostolo Paŭlo

Siegfried KRÜGER, DE

**L**a kristana teologio en la kerno firmtenas la mezepokan mondkoncepton. Pro tio ekzistas diferenco inter la mondkoncepto de la kristana teologio kaj la mondkoncepto de la naturscienco. Ĝi ne kongruas plej vaste kun la spiritaj spertoj de la mistiko, kiu pro tio pli facile povas argumenti ol la klasika dogmatiko.

Kredi al la Spirito de Dio kaj ne nur al dogmo necesas.

## 1. Kor. 3, 16-17

*Ĉu vi ne scias, ke vi estas templo de Dio kaj ke en vi loĝas la Spirito de Dio? Se iu detruas la templon de Dio, tiun detruos Dio; ĉar la templo de Dio estas sankta, kaj vi estas tio.*

La scienco esploris la kosmon kaj nenie ĝi trovis lokon por Dio. Li ĉiam nur estis surogato, kiu havis lokon nur kie la scio de la homo ankoraŭ ne sukcese esploris. Kaj la moderna ateismo profitis de tio, ke Dio ekzistas supre, ekstere kaj ne en ni, la homoj.

Por la apostolo Paŭlo ni estas loĝejo de Dio. Li estas pli proksima al vi, ol vi mem estas.

Mi estas en Dio –

sed ankaŭ Dio estas en ni.

Mi estas en Kristo –

sed ankaŭ Kristo estas en ni.

Ankaŭ la Spirito

kaj la Regno de Dio estas en ni.

Dio en ĉio kaj ĉio en Dio – la konfeso pri la ĉie-stanta Spirito de Dio en la naturo ŝajnas la unusole ebla respondo de kristana teologio al la nunaj eltrovoj de la naturscienco.

Per tio, ke estas donita al ni la Spirito de Dio, ni havas la liberecon por rigardi. Malfermiĝas niaj okuloj. Sed kion ni vidas tio ŝanĝas nin. Rigardo kunligas tiun, kiu rigardas kun tio, kion li rigardas. Se ni rigardas Kriston, estiĝas en ni la nova homo, kiu estas formita laŭ Kristo. Lia bildo ŝanĝas nin al nia propra, esenca homeco.

## 1. Kor. 2, 9-11

*sed kiel estas skribite: Tion, kion okulo ne vidis kaj orelo ne aŭdis, kaj kio en la koron de homo ne eniris, Dio preparis por tiuj, kiuj Lin amas.*

*Sed al ni Dio malkaŝis ilin per la Spirito; ĉar la Spirito esploras ĉion, eĉ la profundaĵojn de Dio. Ĉar kiu inter homoj scias la aferojn de iu homo, krom la spirito de la homo, kiu estas en li? tiel same la aferojn de Dio scias neniu, krom la Spirito de Dio.*

## Rom. 8, 26-27

*Kaj tiel same la Spirito ankaŭ helpas nian malfortecon; ĉar ni ne scias, kiel preĝi dece, sed la Spirito mem propetas por ni per ĝemoj neeldireblaj; kaj Tiu, kiu esploras la korojn, scias, kio estas la penso de la Spirito, ĉar li*



Laŭ Doré: Paŭlo predikas al la Tesalonikanoj

*propetadas por la sanktuloj laŭ la volo de Dio.*

La Spirito, kiu kreis la mondon, kunligas nin kun la prafortoj de la kreaĵo kaj ekas en ni novan kreaĵon. Tio estas ni mem – kaj samtempe Kristo en ni.

Neniu venas alimaniere al la Dio de Jesuo ol per religia sperto, per la mistiko, per la lingvo de la animo (Jörg Zink).

Li vidas grandajn komun-aĵojn inter kristanismo kaj aliaj religioj. Kio la kristanan kredon distingas de ĉiuj aliaj kredmanieroj estas nenio alia ol la soleca, malgranda figuro: Jesuo. Terproksima, kaj diproksima figuro, kiu ekzemplis veran homecon, kaj veran diecon.



## Partoprenantoj de la 62-a KELI kongreso


1. Cousson Philippe,	Francio	13. Farkas Antal,	Rumanio
2. Kronenberger Albrecht,	Germanio	14. Popoviciu E. Ecaterina,	Rumanio
3. Cayzac Hanna,	Francio	15. Oláh M. Judit,	Rumanio
4. Eichkorn Bernhard,	Germanio	16. Polnický Pavel,	Ĉeĥio
5. Fischer O. Arnošt,	Ĉeĥio	17. Rohloff Wolfram,	Germanio
6. Schaeffer K. Heinz,	Germanio	18. Krüger Siegfried,	Germanio
7. Schaeffer Hedwig,	Germanio	19. Fischer Hedwig,	Germanio
8. Dijk van Els,	Nederlando	20. Fischer J. Rudolf,	Germanio
9. Borsboom Ed,	Nederlando	21. Pospíšilová Ria,	Ĉeĥio
10. Ganswijk van Wil,	Nederlando	22. Pospíšil Václav,	Ĉeĥio
11. Gaillard Samuel,	Francio	23. Stier Gabriella,	Rumanio
12. Stamm Sieglinde,	Aŭstrio	24. Ojasild Uku,	Estonio



# Temo por la 62-a KELI kongreso en Zöblitz, Germanio 29. 7. – 5. 8. 2012

**R**ilate al la temo de la kongreso mi proponis lastjare ion rilate al “fundamento aŭ grundo”.

Mia kialo: en pasinteco la enloĝantoj de la ercmontaro fosis en la grundo kaj en ĝi malkovris arĝenton kaj aliajn valorajn mineralojn. Tial fondiĝis en mezepoko multaj novaj urboj kaj tial ĝis hodiaŭ la ercmontaro estas la plej dense



Ercmontaraj lignaĵoj

enloĝata mezmontaro de eŭropo, kvankam ne plu tiel riĉa regiono kiel estis. Mi volas la minadon en grundo kompari kun “minado” en nia religio: Por multaj homoj la kristana religio, diservoj, Biblio, ... estas ne interesa afero, ili vidas nur surfacon kaj rigardas supraĵe. Sed se iu komencas fosi en la grundo de la kristana kredo, li aŭ ŝi certe same trovos valoraĵojn, kiuj riĉigas la vivon. Per temoj kiel “kaŝitaj trezoroj”, “Kiu serĉas, tiu trovas”, “Grundo kaj fundamento de nia vivo” aŭ similaj ni povus diskuti pri ĉio kaj religia kaj kultura, kio – post kaj kun certa peno – riĉigas nian vivon. Mi ekzemple kadre de la temo ŝatus prezenti en prelego kristanan diservon kiel prov-vizito en ĉielo.

*Wolfram Rohloff*

- 
25. Ojasild Endel, Estonio  
26. Hofmann Gerhard, Germanio  
27. Sandoz André, Svislando  
28. Chrdle Petr, Ĉeĥio  
29. Lundkvist Arne, Svedio  
30. Lászlo Maria, Rumanio  
31. Stroinski Monika, Germanio  
32. Stroinski Hieronymus, Germanio  
33. Ráczkevy-Eötvös Ágnes, Hungario  
34. Áradsson André, Hungario  
35. Áradsson Bengt Olof, Svedio  
36. Leuza Ernst, Germanio  
37. Dercks Gerda, Nederlando  
38. Popa Floarea, Rumanio  
39. Dumitrache Rodica, Rumanio  
40. Popa Clara, Rumanio  
41. Enache Florentina, Rumanio  
42. Uta Ioan, Rumanio  
43. Sfrijan Floare, Rumanio  
44. Ghiban Rodica, Rumanio  
45. Crenicean Ion, Rumanio  
46. Campean Sebastian, Rumanio  
47. Campean Ioan, Rumanio  
48. Ile Adelina, Rumanio  
49. Ile Adorian, Rumanio  
50. Farkas-Tatár Éva, Hungario  
51. Bagi Domokos, Hungario  
52. Bagi Máté Lőrinc, Hungario

# Al teologoj, pastroj, pastoroj kaj sacerdotoj, kiuj uzas Esperanton

Koncerne:

invito al kunveno de teologoj kadre de la ĉijara KELI-kongreso en Zöblitz/Saksio

**E**stimataj gekolegoj, mi volas kore inviti vin al kunveno de teologoj, pastroj, pastoroj kaj sacerdotoj, kiuj uzas Esperanton, kadre de la ĉijara KELI-kongreso inter la 29a de julio kaj 5a de aŭgusto.

Kiel (luterana) pastoro mi kun miaj ĉiregionaj kolegoj regule unufoje monate kunvenas por preparoli nian laboron. Iom simile mi nun invitas vin al kunveno de teologoj, kiuj uzas Esperanton, kadre de la ĉijara kongreso de KELI en Zöblitz.

La kunveno okazu je vendredo, la 3an de aŭgusto 2012, inter la 14a horo posttagmeze kaj la 18a horo en la kongresejo. Mi esperas, ke tiel povos partopreni ankaŭ tiuj kolegoj, kiuj ne partoprenos dum la tuta kongreso kaj devos celebri diservon dimanĉmatene.

Kaj la temo? Inter la jaroj 1998 kaj 2000 mi studis en Sibiu/ Hermannstadt/ Nagyszeben (Rumanio) teologion. Tie mi ekkonis kaj ekŝatis ortodoksan Dian Liturgion. Por mia kredo kaj por mia profesia vivo mi el tiu kontakto lernis multon. Tio estas la kaŭzo, ke mi proponas por nia kunveno la temon:

**“Diservo – kial kaj kiel ni festu ĝin?”**

Per enkonduka prelego mi provos klarigi al vi, kio el mia luterana perspektivo estas la celo de diservoj. Kaj mi tre ĝojus, se vi pretus prezenti diservon, liturgion aŭ parton de liturgio el VIA tradicio. Dimanĉe estos ebleco, kuncelebri dulingvan (germana kaj esperanta) diservon en la urba preĝejo de Zöblitz.

Por ke mi povu organizi nian kunvenon, mi petas vin respondi ĝis la 1a de junio 2012, ĉu vi intencas partopreni aŭ ne.

Mia adreso por aliĝoj, demandoj, proponoj k.t.p. estas:  
Wolfram Rohloff, Markt 82, 09517 Zöblitz, Germanio;  
telefono: +49 37363 4424, fakso: +49 37363 4404;  
retadreso: Wolfram.Rohloff@evlks.de

*Wolfram Rohloff*

## **Gravaj rimarkoj:**

Se vi intencas partopreni ankaŭ en la KELI-kongreso, vi nepre aliĝu al la kongreso per la oficiala aliĝilo (trovebla rete).

Se vi volas mendi hotelĉambron por unu aŭ du noktoj, mi povos rekomendi al vi adresojn.

# Ni najbaroj en Eŭropo

## Prelego dum pentekosta kongreso

Gerrit BERVELING, NL

**E**stimataj sinjorinoj kaj sinjoroj! Hodiaŭ ni kunvenis en urbo kiu famas pro grandaj kaj gravaj historiaj momentoj: en 1648 en tiu ĉi urbo oni decidis pri la Pactraktatoj de Münster.

En 1998 oni solene festis la 350-jariĝon de tiuj Pactraktatoj, kiuj post fino de la 80-jara milito (1568-1648) unuflanke establis la sendependecon de la Respubliko de la Unuiĝintaj Nederlandoj disde la Hispana Regno; aliflanke en la 24-a de oktobro la Paco de Münster finis la militon inter la Sankta Romia Regno de Germana Nacieco kaj Francujo; tiu ĉi Paco de Münster estis unu el la 11 memstaraj pactraktatoj, kiuj kune konsistigas la Pactraktaton de Vestfaliao: tio faris en 1648 finon al la 30-jara milito, kiu tiel funde disŝiris grandan parton de Okcident-Eŭropo (1618-1648).

Ĉe vi, Germanoj, probable la memoro precipe reiras al la Packontrakto de la 24-a de oktobro: Vestfaliao, Osnabrück / Münster.

Ĉe ni, Nederlandanoj, supozeble la memoro reiras precipe al la Packontrakto kiun oni fiksas en la 30-a de januaro en la Krameramtshaus, la nuna “Haus der Niederlande”, kaj kiun iom poste oni solene priĵuris en salono en la urbodomo ĉe Prinzipalmarkt, nuntempe konata kiel “Friedenssaal”, en la 15-a de majo.

La 30-jara milito kostis la vivon al milionoj da homoj – laŭ historiistoj inter 6 kaj 12 milionoj da personoj fariĝis viktimoj – atentu: 6 ĝis 12 el la tiutempa totala loĝantaro de ĉirkaŭ 20 milionoj en la Germana Imperio.

Kaj nun ĉi tie do ni kunvenis, en tiu ĉi historie ŝarĝita urbo: urbo de packontraktoj. Urbo de paco.

La temo de nia komuna [pentekosta] Esperanto-kongreso estas “Najbaroj en Eŭropo”.

Kio estas najbaroj? Nu, la etimologio nin helpas rapide: en la *Etimologia Vortaro* de Ebbe Vilborg ni trovas, ke la vorto devenas de Angle *neighbour*, Germane *Nachbar*, Nederlande *nabuur*: la laŭlitera senco de najbaro estas *nach* = *proksime* kun *bahr* el *bauen* – *konstrui*, do la najbaro laŭlitera estas tiu, kiu proksime konstruas.

Sed kion karakterizas najbaroj?

Unuflanke ni povas pensi pri nia propra vivo: ĉu ni loĝas en urbo, vilaĝo aŭ aliloke – ĉu najbarojn ni havas? Ĉu tiujn ni konas? Ĉu tiujn ni kontaktas? Ĉu ili efektive konstruas proksime? ĉu – kaj mi nun inversigas intence – ĉu ni konstruas proksime al ili / kun ili?

La Nederlanda termino *nabuur* por kelkaj sonas iom eksmode, laŭ iuj ĝi ĉefe estas regiona esprimo, kiu substrekas, ke al bona najbareco apartenas zorgemo pri la apude loĝantaj: se en vilaĝo ekzemple iu mortas, la najbaroj

portempe transprenas certasence la zorgon pri la familio, kune vigilas ĉe la mortinto ktp.

La Franca aŭtoro Amin Maalouf (naskita en 1949) verkis tutan serion da atentindaj libroj: unuflanke plurajn romanojn kiuj ĉiuj limas inter malsamaj kulturoj – li mem denaske devenas el Libano, loĝas en Francujo, parolas Arabe kaj France, do vivas dukulture. Ankaŭ plurajn libretojn li verkis por modernaj operoj de Finna komponistino Kaija Saariaho. Ree rande de malsamaj kulturoj. Sed precipe interesaj mi trovas du librojn liajn, kiujn li mem titolas *eseoj*, sed kiuj estas efektive tre pensinstigaj studaĵoj pri gravaj nuntempaj fenomenoj: *Les Identités neutrières* kaj *Le Dérèglement du monde*.

Mi iom volas rakonti pri la unua.

Ĉie ĉirkaŭ mi en Nederlando – kaj mi timas, ke en Germanio same – oni ege rapide venas lastatempe al la demando pri ies nacieco: se okazis iu problemo, se estis iu kverelo – tuj: ĉu estis Turko, ĉu Marokano, ĉu Nederlandano? Antaŭ kelkaj jardekoj tio estis multe malpli tuja reago.

Kiam kiel junulo 21-jara mi volis klare montri, ke mi volas ekkoni la mondon pli vaste ol estis kutimo en mia ĉirkaŭaĵo, mi aĉetis pasporton kaj trajnbileton por Zagrebo: al Jugoslavio, lando pri kiu preskaŭ nenion mi sciis. Mi ankaŭ konis neniun kiu ĝin vizitis tiuepoke. Estis tiel fore. Por mia junula sento preskaŭ sur alia mondo.

Fariĝis por mi ege grava tiu feriado: unuafoje eksterlande, kompreneble tute sola, ĉar neniun el parenkaro aŭ amikoj volis aŭ pretis akompani min. Unuafoje

en lando, kie la lingvon mi ne scipovis: en la gimnazio mi lernis la kutimajn tri modernajn fremdlingvojn, Francan, Anglan kaj Germanan, kiujn poste universitate mi bezonos. Kaj la klasikajn Latinan kaj Grekan. Sed tie – tuj post alveno en la Zagreba stacidomo mi aĉetis poŝvortareton pri la Serbokroata, trastudis la bazan gramatikon, ellernis kelkajn simplajn saluto- kaj ĝentilecofrazojn, plus la ĉefajn ciferojn – kaj jen ĉio. Tamen, kun multaj homoj, precipe kun junuloj, tie mi interparolis. De Homero mi ja lernis ke laŭ Odiseo oni ĉiam konduku: πολλῶν δ' ἀνθρώπων ἴδεν ἄστεα καὶ νόον ἔγνων – de multaj homoj urbojn li vidis kaj ekkonis pensmanieron. Do mi alparolis multajn, foje eĉ havis longajn diskutojn. En Dubrovnik en ia monaĥejo eĉ la Latinan mi povis uzi.

Reirante hejmen, kiam ekmontris sin la fundo de mia monujo, mi veturis sur ŝipo laŭ la tuta Adriatiko ĝis Rijeka. Surŝipe estis tre malmultaj turistoj, kaj preskaŭ nur soldatoj Jugoslaviaj: mi scivolis pri ili, eĉ ne povis distingi ilin: ĉu estas iu pli grava en rango? La knabo, kiun pri tio mi alparolis, ridante klarigis ke ili ja ĉiuj sin konas – ili ja *scias* kiu estas la gvidanto de la grupo. Do ne gravas. – Scivole mi informiĝis, kio li estas, ĉu Kroato aŭ Serbo aŭ .. li protestis: tio ne plu ekzistas. Ĉiuj ni estas Jugoslavo. Tio estis en 1965.

Sed ĉiuj ni scias, kio okazis kelkajn jarojn poste: disfalis Jugoslavio kaj subite ne plu ekzistis Jugoslavo, sed ja Serboj, Kroatoj, Bosnianoj ktp...

Kio estas ni homoj? Ĉu karakterizas nin nia identeco? Kaj se jes: kio estas

nia identeco? Ĉu nia politika konvinkiĝo, ĉu nia religio, ĉu nia lingvo, ĉu nia nacia deveno?

Mia impresio estas, ke tiu ĉi temo deponas la lastaj jardekoj de la pasinta jarcento fariĝis ĉiam pli grava: ankaŭ inter esperantistoj ofte mi ĉeestis debatojn, ja foje akraj kvereloj eĉ: unuflanke mia baza konvinkiĝo – kiun same voĉigis tiu anonima Jugoslavia soldato sur la ŝipeto –, ke nacia deveno entute ne gravas, almenaŭ ne devas esti grava, kaj rekte male la konvinkiĝo ankaŭ de multaj fervoraj esperantistoj, ke ĝuste tiu nacieco ege gravas.

Zamenhof faras fortan distingon inter la nocio *patrioto* kaj tiu nacia sinteno.

Maalouf, en sia *Les Identités meurtrières* forte pledas por tio, ke oni montru kiom eble da identecoj: devene li estis el Libano, sed en lia parenkaro estas ligiteco kun Egiptujo same kiel kun la Osmana Regno; aliflanke li estas Franco, jam delonge Franca ŝtatanano, li estas Arablingva sed same Franclingva ktp ktp. La nuna sinteno ĉe multe da homoj, kaj en multe da gazetaraj kaj televidstacioj, limigi la identecojn laŭ difinita elektita ero: jen tio estas Islamano! lia opinio estas vere mortiga, eĉ murdiga.

Pasintan semajnon en la lernejo, kie mi laboras, mi aŭdis de koleginino, ke ŝia edzo, kiu estas Turkdevena Nederlandano, biciklis en la ĉirkaŭo de la urbo, kaj ie ĉe vojkruciĝo haltigis lin iu nekonato dirante: Mi ja konas vin! mi legis la artikolon en la gazeto pri vi! mi scias kie trovi vin, Turko! – Tio estis rekta minaco. La koncerna sinjoro en intervjuo estis klare pledinta por reci-

proka interkonatiĝo inter diversreligiaj kaj diverskulturaj grupoj, precipe kie koncernas Turkdevenajn Islamanojn kaj Nederlanddevenajn protestantojn.

Jen kiel foje funkcias nuntempe aŭ ne funkcias nia bela idealo de najbareco – *nabuuŝchap*.

Ĉar mi jam menciis la temon, mi kredas ke estas bone iom pli trakti ĝin. Eble en postaj tagoj ni trovos eblecon private inter ni plu paroli pri ĝi. Estas ja sufiĉe grava temo, mi taksas.

Dum la pasinta Malferma Tago de UEA (la 14-an de majo ĉi-jare) mi iom parolis pri, kaj kun kelkaj ĉeestantoj mi iom legis el Erasmo. Li vivis en epoko ege grava por Eŭropo: 1466/67/69? – 1536. Estas karakterize, ke lia naskiĝtago estas konata – la 27-an de oktobro –, sed la jaro ne tute certas. Datojn oni tiuepoke pendigis al kalendaro de sanktuloj, sed jaroj nu... se ne temis pri gravuloj, princoj, reĝidoj k.s.... la jaroj forgesiĝis.

Kiel ajn: Erasmo vivis dum Eŭrope grava periodo: ĝuste tiutempe eniris mirinda eltrovo la okcidentan mondon: la presarto. Tio implicis, ke libroj deponas tiam en neimageble pli granda kvanto diskoniĝis. Li estis la unua furora aŭtoro de Eŭropo – de kelkaj liaj verkoj aperis dekoj da eldonoj dum lia vivo. Eĉ pirataj eldonoj! Temas ĉe la invento de l' presarto pri kulturŝoko minimume same grava kiel nia epoko la elektronika revolucio en la Reto: kaj oni kombinis la eblecojn de la nova presarto kun grandioza entrepreno por transdoni kaj ree ekuzi ĝisfunde la jam ekzistantan tradicion Latinan kaj Grekan – tion ni nomas la Renesanco: ne Erasmo ĝin inventis, sed li estis naskita en ĝin kaj

plejentuziasme, plenergie li kontribuis al tiu flanko de la Renesanco, kies moto efektive estis *ni lernu el la pasejo por prepari nin por la estonto*, aperigante, komentariante, diskonigante valorajn verkojn de tuta serio da aŭtoroj el pasintaj epokoj: mi nur nomas la ĉefajn, kiujn Erasmo reeldonis, ofte en pligustigita eldono: Hieronimo (1516), Cipriano (1520), Arnobio (1522), Hilario (1523), Ireneo (1526), Ambrozio (1527), Aŭgustino (1528/29), Ĥrizostomo en Latina traduko (1530) kaj Bazilio (1532).

nepre neniam ni simpligu la  
mondon tiamaniere, ke ni difinu  
iun ajn per unusola identeco!  
Ĉiu homo estas ja konebla per  
tuta amaso da identecoj

Samtempe Erasmo estas grava por la Reformacio, ĉar li – unua en la mondo – sciis aperigi *presitan* Novan Testamenton en la origina Greka kun akompana – ĝustigita – Latina traduko. Tio fariĝis furoraĵo, por multaj nuntempuloj eble iom mirige: sed oni komprenu bone, ke granda plimulto tiuepoke estis kristanoj, sekve la Nova Testamento por ili estis baza verko por la vivo. Kaj la eldono de Erasmo montris, ke plurloke la ĝistiamaj tekstoj entenitis erarajn. Li ĝustigis tiujn, li komentis tion surbaze de tekstoj tra la historio: por montri de kie devenas erara interpretado kaj kiel ĝi diskonigiĝis. Al multaj tio malfermis la okulojn. La unua eldono de lia Nova Testamento aperis en 1516, kaj kiel certe vi scias, en 1517 disfamiĝis Lutero

kiu senintence kaŭzis la rompiĝon de la okcidenta kristanismo en katolikismon kaj protestantismon. Unu el ĝiaj sekvoj plej teruraj estis la multaj religiaj militoj.

La eldono de Erasmo fariĝis la bazo de la novaj nacilingvaj tradukoj kiuj grave stimulis la disvolviĝon de l' Reformacio.

Dum tuta sia vivo Erasmo mem rifuzis partianiĝi en la Reformacia debato: oni riproĉis al li, ke li estas tro senkuraĝa, ke li estas kameleono, ke li ne montras viran fortecon. Erasmo, tamen, pledis daŭre por interkompreno kiom nur eblas.

Unu el la politike gravaj temoj de lia epoko estis: kiel kondukti fronte al Islamo, kaj plej konkrete: fronte al la Turka Osmana Regno. Okazis tiujarcente marbataloj en Mediteraneo (restis fama la marbatalo ĉe Lepanto en 1571, unu el la plej grandaj marbataloj de la historio), okazis militadoj surtere ĝis eĉ minaco plej konkreta en 1683: “la Turkoj staras antaŭ la Aŭstra urbo Vieno!”

Kion diris Erasmo? En siaj *Antaŭparoloj al la Nova Testamento* li konsilas traduki la Bibliion, kaj minimume la ĉefajn partojn – evangeliojn kaj leterojn de Paŭlo – en ĉiujn naciajn lingvojn – do ankaŭ en lingvojn Turkan kaj Saracenan, kaj disponigi tiujn tekstojn al islamanoj por poste kun ili ekdebati pri la religiaj problemoj. En speciala verkaĵo pri la milito kontraŭ la Turkoj, kiun kun lernantoj miaj antaŭ du-tri jaroj mi traktis lerneje, je granda miro de miaj lernantoj Erasmo ree pledis por diskonigo de la Biblio inter islamanoj, por reciproka serioza debatado, por senperforto. Li diras, ke la kialoj,

kiujn fakte oni uzas por ataki la Turkojn tute ne taŭgas, kaj kialojn, kiuj ja povus esti taŭgaj, manko je libereco ekzemple, oni ne uzas, ĉar ankaŭ kristana flanko kulpas similmaniere pri manko de libereco ĉe la homoj.

Do, kiel kondukti al siaj najbaroj laŭ Erasmo? Se resumi simplige: kiam la najbaroj ne plaĉas, oni provu konverti ilin, nepre ne perforte sed per argumentoj, per debatoj, per rezonadoj.

Kaj ni, en nia nuna realo?

Laŭ mi estas tre senchave, atenti pri la avertoj, kiujn liveras Amin Maalouf: nepre neniam ni simpligu la mondon tiamaniere, ke ni difinu iun ajn per unusola identeco! Ĉiu homo estas ja konebla per tuta amaso da identecoj – oni nur rigardu pli atente. Mi prenu min mem, ne ĉar mi estas tiel grava, sed simple kiel ekzemplon: Jen Nederlandano, tre stulta kaj senscia pri dialektoj, homo kiu aliflanke iom dise legadas plurlingve, kiu ŝatas vojaĝi kaj ekkoni homojn, urbojn, kutimojn, homo kiu religie apartenas al kristanismo sed sen dogmaj limigoj, homo kiu serĉas kontaktojn kun alireligiaj homoj, por reciproke provi kompreni pensmanierojn, homo kiu serĉas kio instigas homojn vivi pace, vivi kun fido je estonteco, homo, kiu provas vivi en fidelo, fidinda al homoj, al parencoj, al amikoj. Se nur unu flankon oni emfazas, mil aliajn flankojn oni forgesas.

Kaj laŭ mi sama statas pri ĉiuj homoj en nia reala mondo.

Se la averton de Maalouf oni prenas serioze, ne havas sencon miaopinie, serĉi kiu estas nia aŭ niaj malamiko aŭ malamikoj. Veraj malamikoj ja ne ek-

zistas: ekzistas nur kunhomoj, homoj kiuj same kiel ni estas metitaj sur tiun ĉi mondon – neniu ja inventis sin mem. Ni troviĝas ĉi tie. Troviĝi – belega verbo – nek aktiva nek pasiva: kaj tio estas grandioza *fakto*. Ni troviĝas ĉi-monde. *Alia* instanco tion kaŭzis. Ĉu Dio ni nomu tiun instancon, aŭ ĉu prefere: la Naturo? Laŭ mi ne vere gravas.

Ni troviĝas ĉi-monde. Ni estas kvazaŭ donacoj unuj por la aliaj. Donacoj foje malfacile akcepteblaj ĉar foje ĝenaj. Ni ja povas esti ĝenaj por niaj kunhomoj – tamen: kiel ajn: al neniu el ni apartenas la mondo, neniu el ni havas kopirajton pri la vivo.

Ni troviĝas ĉi-monde. Ni estas kvazaŭ donacoj unuj por la aliaj. Donacoj foje malfacile akcepteblaj ĉar foje ĝenaj.

Tio miaopinie aŭtomate devus konduki nin al reciproka – mi dirus: *mini-muma* respekto unuj fronte al la aliaj... Mi kredas, ke Erasmo en sia tempo tion jam bone perceptis: ni povas malkonsenti kun aliaj, ni eĉ povas kontraŭi kelkajn homojn kaj iliajn ideojn aŭ idealojn, sed ni ne havas rajton pri absoluteco. Ni neeviteble estas devigataj respekti la ceterajn en ties alieco. Erasmo dirus: sendu al ili viajn sanktajn librojn – ĉion, kio al vi estas sankta, valora, neforigebla – kaj ekdiskutu pri tio.

En tiu senco mi kredas, ke ni povas esti najbaroj en Eŭropo: ĉiu konstruante proksime al la ceteraj pri ĉiam pli nova valora estonto! Mondo en kiu indas vivi.



# Ĉevaleto gvidas homojn al misiisto

Vilĉjo GOLDSMITH, Usono

**M**i jam skribis [numero 5/2011] pri la pastreco de la misiisto William Marcus Young inter la Lahu tribo el Birmo. Dume, la Spirito de Dio moviĝis inter la sovaĝa Wa tribo el la sama lando. La anoj el la Wa estis ĉasistoj de homaj kapoj. Sed ili nur ĉasis kapojn kiam ili semis iliajn rikoltojn! Ili sentis devigitaj de sangavidaj “nats” (malbonaj spiritoj – demonoj) semi homajn kapojn kune kun la semoj por certigi bonan rikoltaĵon.

Sed de tempo al tempo, profetoj de la vera Dio (kiun la Wa nomis “Siyeh”) leviĝis por kondamni la ĉasadon de kapoj kaj la kvietajon de malbonaj spiritoj. Dum la 1890 jaroj, leviĝis tia profeto nomata Pu Ĉan. Li diris ke Siyeh, la vera Dio, baldaŭ sendos “blankan fraton kun ekzemplero de la perdita libro.” Se tiu “frato” alproksimiĝus al la regionon de la Wa kaj se li eksciis ke la Wa agas tre malbone, li povus pensi ke ili estas malindaj de la libro de la vera Dio. Tial, la frato forlasus la Wa tribon kaj ili neniam havus alian ŝancon por ricevi la perditan libron. Per tia mesaĝo, Pu Ĉan persvadis kelkajn milojn da la Wa ke ili forlasu la ĉasadon de kapoj kaj la kvietajon de malbonaj spiritoj.

Unu tagon matene, Pu Ĉan selis ĉevaleton. Li diris al iuj el siaj disĉiploj: “Siyeh diris al mi la pasintan nokton ke la blanka frato fin fine alproksimiĝas. Siyeh utiligos ĉi tiun ĉevaleton por

gvidi vin al li. Kiam vi trovos la blankan fraton, lasu lin surseliĝi ĉi tiun ĉevaleton. Ni estus nedankemaj homoj se ni permesus lin piediri la lastan parton de sia vojaĝo ĝis nin!”

La disĉiploj de Pu Ĉan tre miris kiam la ĉevaleto komencis troti. Ĝi gvidis ilin preskaŭ 300 kilometrojn trans riverojn kaj montojn ĝis la urbegon Kengtung. La ĉevaleto eniris korton kaj iris rekte al puto kie ĝi haltis. La disĉiploj de Pu Ĉan rigardis ĉiun flanken sed ili vidis nenium.

Nelda Widlund, filino de Vicente Young kaj nepino de William Marcus Young, persone rakontis al Don Richardson (aŭtoro de “Eternity In Their Hearts – “Eterneco En Iliaj Koroj”) tion kio okazis. Nelda loĝis en tiu misia stacio kiel knabino kaj ŝi ofte trinkis el tiu sama puto. La anoj el la Wa aŭdis sonojn el la puto. Ili rigardis internen kaj ne vidis akvon sed du blujajn okulojn rigardantajn ilin el afable blanka vizaĝo kun barbo.

“Saluton, fremduloj! Ĉu mi povas helpi vin?” La voĉo estis de William Marcus Young. La misiisto supreniris el la puto (li ankoraŭ fosis ĝin). La mesaĝistoj el la Wa demandis lin: “Ĉu vi alportas libron de Dio?” S-ro Young kapjesis. Ili tre emociiĝis kaj falis antaŭ liaj piedoj. Ili donis la mesaĝon de Pu Ĉan kaj tiam diris: “Ĉi tiu ĉevaleto estas selita speciale por vi. Nia popolo atendas vin. Alportu la libron! Ni devas



foriri rapide!”

S-ro Young rigardis ilin: “Mi ne povas foriri. Multaj anoj el la Lahu alvenas tage por ricevi instruon. Kion mi faros?” Li konsultis kun Lahu kristanoj. Ili decidis gastigi la Wa virojn por ke ili povos ricevi instruon pri la kristana fido. Post kiam ili ricevis la instruon, ili faris vojaĝojn al la regiono de la Wa por instrui sian propran popolon. Tiel, Pu Ĉan kaj miloj da la Wa iĝis kristanoj sen iu vizito de William Marcus Young.

La knabo Vicente Young, patro de Nelda Widlund, kreskis aŭdinta la Wa lingvon. Poste, kiel adoleskulo, li faris vojaĝojn al la regiono de la Wa por doni al ili pli detalan instruon. Li bone lernis la Wa lingvon, kaj post kiam li tradukis la Novan Testamenton al la Lahu lingvo, li tradukis ĝin al la Wa lingvo.

William Marcus Young, kun siaj du filoj, kaj iliaj helpantoj – krom baptinte 60.000 homojn el la Lahu tribo – baptis aliajn 10.000 homojn el la Wa tribo. Kiam Don Richardson finis sian interparolon kun Nelda Widlund, ŝi demandis: “Don, ĉu vi dezirus koni mian patron, Vicente Young? Ĉu vi dezirus vidi malnovan foton kiun mia avo faris pri la Wa ĉevaleto kun la selo sur ĝia dorso?”

“Ĉu via patro ankoraŭ vivas?” ek-kriis S-ro Richardson, tre surprizita. S-ino Widlund respondis ke ŝia patro havas 80 jarojn kaj ke li loĝas proksime al ŝi en la ŝtato Kalifornio (estis dum la

1970 jaroj). Poste, S-ro Richardson ek-konis S-ron Vicente Young en lia domo. S-ro Young montris al li ne nur la foton de la ĉevaleto, sed ankaŭ centojn da aliaj malnovaj fotoj. Tie staris William Marcus Young kaj la indiĝenaj helpantoj kiuj laboris kun li. S-ro Richardson vidis sur la fotoj centojn da homoj de la Lahu kaj la Wa triboj starintaj en la rivero kaj atendintaj esti baptitaj. Li vidis en la fotoj ankaŭ aliajn milojn da indiĝenoj rigardantaj la baptojn.

Ĉu ni rajtas dubi ke Dio povis utiligi ĉevaleton por gvidi tiujn Wa virojn tra granda distanco? Certe la Dio kiu utiligis stelon por gvidi la saĝulojn al la domo en Bet-leĥem kie estis la infano Jesuo, povis utiligi ĉevaleton por trovi William Marcus Young interne de puto en Kengtung!



William Marcus Young

Rimarko: Se vi komprenas la anglan lingvon vi povas legi pri la agado de la sekvuloj de William Marcus Young ĉe TTT-paĝo:

[http://www.divineinheritance.com/driver.aspx?Topic=ourhistory\\_whiteDonkey&di=1](http://www.divineinheritance.com/driver.aspx?Topic=ourhistory_whiteDonkey&di=1)

# Henk de Hoog – Andreo Cseh 3

Redaktis Ed BORSBOOM, NL

*En 1942 estis evakuita la loĝantaro de Scheveningen, la ĉe-mara parto de Hago. Tuj post la fino de la milito en 1945 la homoj povis reiri al siaj domoj, escepte tiuj el unu scheveninga kvartalo, nomita Duinoord. El ĝi la nederlanda registaro faris koncentrejon kun fostoj kaj pikdrato por provizore malliberigi ĉiujn, kiuj estis fikunlaborintaj kun la germanoj. En Duinoord troviĝis la lernejo, kie antaŭ 1942 De Hoog instruis. En 1942 Julia Isbrucker kaj Andreo Cseh fondis Universalan Ligon. Tiu organizaĵo volis subteni la kreadon de tutmonda federacio de ŝtatoj por eviti novan militon. La laborlingvo de la Ligo estis Esperanto. Aliĝis miloj da interesitoj, ankaŭ ne-esperantistoj, sed ne la planitaj 100.000 membroj.*

[Cseh=teksto Cseh, Hoog=teksto De Hoog.]

Amsterdam, 1945-07-07

Al s-ro Cseh,

La 5-an de julio, do en la tago post kiam mi vizitis vin, mi havis interparolon kun la lernejestro de mia Ŝheveninga lernejo. Li urĝe petis min akcepti alian oficon, ĉar ĉiuj instruistoj el Duindorp, nun koncentrejo, ricevos “atendan monon”, per kiu vivi estas preskaŭ neeble. Verŝajne mi restos en Amsterdamo. Bonvolu kalkuli tion en viaj planoj.

Hieraŭ mi dediĉis kelkan tempon al atenta tralegado de la presota alvoko /por *Universala Ligo*/. Kiel ĝisosta instruisto, kavaliro de la ruĝa krajono, mi ne povis lasi substreki kelkajn malglataĵojn:

- 1) **Cseh** “Finiĝis la dua granda sinmortiga provo de la civilizita homaro. Ĝi ne tute sukcesis, ĉar apud la nekalkulebla nombro da kadavroj restis ankoraŭ postvivantoj: Milionoj da vidvinoj kaj orfoj, milionoj da kripluloj kaj malsanuloj, milionoj da senhejmuloj kaj malsatantoj.”

Foto farita de Ed Borsboom dum la vizito ĉe Henk de Hoog en 1979 en lia loĝejo en Castricum (provinco Noord-Holland, norde de Amsterdam).



**Hoog** Ĉu ne pli bone ellasi la dupunkton post vivantoj kaj korekti tiel: “restis ankoraŭ postvivantoj, inter kiuj milionoj ...”/Ĉar/feliĉe ke la plimulto de la homaro ne estas en tiuj grupoj.

2) **Cseh** “krei tiun federacion”.

**Hoog** Ĉu ne pli bone “krei tian federacion”?

3) **Hoog** La frazo “...la homaro, al kies sorto ni devas subiĝi” estas malbona. Ĝi sonas iom fatalista, mohametana. Ĝi rememorigas al ni la /*germanan*/ Schicksal de Goebbels. Ĉu ne pli bone “la homaro, kies membroj ni ĉiuj estas kaj restos en tagoj de prospero kaj malprospero.”?

4) **Cseh** “Kiel unuan taskon, por bazo al efika laboro, ni fiksas la kolektadon de 100.000 membroj.”

**Hoog** La tasko ne estas la bazo. Enmetu do “kiel”. “kiel unuan taskon, kiel bazon al...”

Ĉi kune mi sendas la aliĝilon de mia edzino.

Kun ligaj salutoj, H.de Hoog

Hago, 1945-07-15

Al s-ro De Hoog,

Ricevinte vian leteron de la 7-a de julio mi dankas pro la utila ekzercado de via kavalira kvalito. Tiaj rimarkoj estas tre bonvenaj. Ĉi tie mi sendas novajn kopiojn de la teksto. Vi vidas, ke mi uzis viajn konsilojn preskaŭ ĉie.

Kun intereso mi legis vian informon pri via eventuala fiksiĝo en via ofico en Amsterdamo aŭ ricevo de atendmonon. Vi scias, ke la kaso de la Ligo en la komenco ne povas permesi al si la lukson dungi taŭge salajratajn oficistojn. Sed la problemo bonege solviĝas per dungo de pensiitoj aŭ atendmonuloj, kie la Ligo povas kompletigi la salajron ĝis la ordinara nivelo. Do se vi havas emon kunlabori en la Centra Oficejo de la Ligo, mi petas vin preferi la atendmonon. Tiukaze jam tre baldaŭ vi povus kun via familio reveni al via kara Hejmurbo.

Je nia peto la regno redonis al ni la malnovan institutan domon (Riouwstraat 172), kaj en la komenco de aŭgusto ni povos eniri en ĝin. Kaj konfidence mi povas komuniki al vi, ke ni luprenis ankaŭ najbaran domon (n-ro 170) por la estonta pligrandigo de la oficejo. Eble vi trovus en ĝi loĝejon provizoran, se alimaniere ne povus akiri.

Kun ligana saluto, A.Cseh

Franz-Georg kaj Rita RÖSSLER, DE

**L**a Salette estis kaj estas sensignifa vilaĝeto en la francaj Alpoj ie inter Grenoble kaj Gap. Troviĝas nur sovaĝa arbaro, modestaj kampoj kaj vastaj deklivaj herbejoj. La 19an de septembro en la jaro 1846 tie du infanoj, Maximin Giraud, 11jara kaj Mélanie Calvat, 15jara, dungitaj el la proksima pli granda vilaĝo Corps, helplaboris paŝtante malgrandajn gregojn en la montaro. Ne parencoj kaj nur foje renkontiĝantaj, ili estis analfabetoj kaj vivis en familioj sen religia entuziasmo. En tiu tago ili hazarde kunvenis kun siaj bestoj en la sama herbejo, du horojn for de la vilaĝo, alte en la montoj.

Kiam ili post tagmeza ripozo denove okupiĝas pri la bestoj, ili rimarkas radiantan lumbulon kun homa silueto interne. Alirante ili ekvidas virinon sidantan sur ŝtono arde plorantan en afliktiĝa pozo. Ŝi leviĝas kaj invitas ilin proksimiĝi. Tuj ŝi komencas komuniki al ili mesaĝon, foje en rekta interparolado kun la geknaboj. Post kiam la infanoj ne bone komprenas ŝian norman francan lingvaĵon, ŝi senprobleme transiras al la regiona dialekto. Al ĉiu infano ŝi aparte konfidas sekreton, kiun la alia ne povas aŭdi. La virino ne identigas sin, sed parolas pri sia filo, kiun oni povas facile subkompreni Jesuo. Ankaŭ la granda kruco pendanta de sur kateno ĉe ŝia ŝultro kun korpo vivsimile suferanta kaj sanganta, gvidas al tia konkludo.

Reirante al la franca lingvo, ŝi anoncas la abundan fluadon de nova fonto tiu-ĉiloke kaj ordonas dufoje “Nu, miaj infanoj, vi transdonos ĉion al mia tuta popolo.” Poste ŝi moviĝas ŝvebe al kumuleto, leviĝas iomete kaj malaperas en la ĉirkaŭanta lumo.

### La mesaĝo

La mesaĝo koncernas la religian vivon de la regionanoj. Ĝi riproĉas la neglekton de la dimanĉo, la sakradon de la ĉaristoj, la ignoradon de la fastoordonoj. Kaze de rifuzo de submetiĝo, de pento, de pliboniĝo ĝi anoncas malmildan punon. La “Bela Damo”, kiel ŝin nomas la viziuloj, montras daŭre plorantan afliktiĝon, sed ŝiaj eksplikoj, ekzemploj kaj klarigoj estas rektaj, drastaj, aktualtemaj kaj bone kompreneblaj por ordinaraj homoj de la regiono.

Alie statas kun la sekretoj. En 1851 la infanoj devis noti ilin por la Papo. Dum la tempo tiuj versioj perdiĝis en la Vatikano. En 1879 Mélanie publikigis alian version, iom kontestatan de la ekleziaj aŭtoritatuloj. Tie la alineoj traktas la konduton de pastroj, la sorton de papoj, politikajn eventojn, terurajn prognozojn, minacojn kaze de malkonvertiĝo, en tre konkretaj bildoj, kun tempaj indikoj kaj en klera lingvaĵo. Admirinde, ke infano povis parkerigi tekston tiom longan kaj tiom for de la propraj konoj.

## La agnosko

Post la apero la infanoj descendis al la vilaĝeto kaj fervore raportis pri la evento. Maximin reiris tuj al sia hejmvilaĝo, Mélanie restis deĵorante en la montoj. Sekve de la diskonigo okazis tutaj konvertiĝoj en la popolo, sed ankaŭ leviĝis duboj. La politikaj kaj ekleziaj esplorantoj ne povis trovi trukon, diferencojn, mensogojn en la eksplikoj de la malkunaj infanoj. Ene de la du unuaj jaroj 300 000 homoj vizitis la nur pene atingeblan lokon. En 1851 la episkopo de Grenoble proklamis post severaj pridemandadoj kaj esploroj, interkonsente kun la Sankta Seĝo, ke en la paŝtejo de La Salette aperis la Dipatrino Maria kaj ke oni tie konstruu pilgriman preĝejon kune kun la fondado de misiista ordeno, servonta al la pilgrimantoj. Ankaŭ postaj papoj montris simpatian, do, nova sanktejo estis kaj restis instalita, malgraŭ kontraŭreligiaj fazoj en la franca politiko.

## Nuntempo

Estus facile, ironie trakti la kazon La Salette, kie du malkleraj infanoj asertis kontakton kun bela damo, kiun la eklezio identigis kun la Patrino de Jesuo. Fakte estas kiel ofte ĉe mirakloj: ne nepre la afero mem estas la miraklo, sed ties efiko. Pri la malagrabla sorto de

dubantoj ne estu dirate. Kiel kleran agnoskanton oni povas citi la francan literaturiston Paul Claudel, membron de la Franca Akademio. En sia libro “La revelacioj de La Salette” (1946) li donas ekzegezon de la aŭtentaj tekstoj, de la konduto de la Damo kaj de ties vestoj plus akcesoraĵoj, adaptante ĉion al la situacio kaj kompreno de liaj samtempanoj, al la tuta mondo de la dudeka jarcento. Li eĉ inkludas la tragikan akcidenton de kanada pilgrimgrupo, veninta el Romo kaj pereinta en aviadila kraŝo ĉe flanko de la apuda impona montego Obiou.

Hodiaŭaj pilgrimantoj trovas surprizan areon multe pli trankvilan ol tiuj en Lourdes kaj Fatima. La tiamaj eventoj respeguliĝas en vivsimilaj statuoj de la infanoj kaj de la Damo. La fonto invitas al trinkado, la preĝejo al diservoj, la tuta loko al meditado. Migr-emuloj povas atingi la pinton de la lokmonto Gargas, alte super la sanktejo, en grandioza alpa naturo. Restado eblas en la alordigitaj hotelinstalaĵoj.

La loko La Salette, 1800 metrojn super la Mediteraneo, 15 kilometrojn for de la vigla ŝoseo, fine de valo, situanta senbrue en inspira montara pejzaĝo kun verdaj herbejoj, nokte sub senvuale brilantaj steloj, invitas al la renkontiĝo kun la propraj juĝoj kaj antaŭjuĝoj, ne nur rilate la aperon de la Dipatrino en la aktuala mondo.

(La artikolo estas dediĉita al la memoro de Jacques Tuinder, kiu mortis, kiam ni estis survoje al La Salette. Estis Jacques, kiu peris al ni ekspozicion en la monaĝejo de Egmond (NL), kiu efektiviĝis sub la titolo “Mi levas miajn okulojn al la montoj, de kie venas helpo por mi.”) *cs*



# Informo

## Unika studebleco

**N**ia usona peranto Jerry Veit atentigas al unika studebleco ĉe [www.unboundbible.org](http://www.unboundbible.org). Tie vi povas samtempe kompari plurajn lingvajn bibliajn tekstojn. Eblas serĉi tekstpartojn per iu ajna [angla] vorto.

Ekzemple serĉu per la vorto "love":

[EN] but I know you, that you do not have the love of God in yourselves.

[E-o] Sed mi vin scias, ke vi ne havas en vi la amon al Dio.

[DE] aber bei euch habe ich erkannt, daß ihr die Liebe Gottes nicht in euch habt.

Tre kore salutas  
Siegfried KRÜGER

Ĉu vi memoras la kantlibreton "Tero kaj Ĉielo"

## BREIT AUS DIE FLÜGEL BEIDE

458

Jesuo, nun etendu  
flugilojn ambaŭ, sendu  
ripozon al teran'.  
Satanon for-komandu.  
Anĝeloj Viaj kantu:  
"Sirmata dormu ĉi infan'."

Alternative 1  
Kokidon Vian prenu  
sub la flugilojn; tenu  
protekte ĝin en man!  
Forkuru malamiko,  
pro anĝelar-kantiko  
"Sirmata ..."

Muziko: Innsbruck, Adoru Kantante n-ro 59  
Vortoj: Paul Gerhardt, 1607-1676  
El la germana trad. A. Burkhardt 1987

## De nia legantaro

**K**araj, mi multe gratulas vin ĉar jam ricevis vian revuon pri “Dia Regno” antaŭhieraŭ.

Mi kuraĝigas vin, daŭre propagandi la bonan parolon pri Dio en diversaj medioj .


Aldone, mi sendas al vi mian familian fotoĵon kaj fotoĵoj pri lignaj artaĵoj .

Bondezirojn al vi ĉiuj el KELI .

Vivu KELI !

Frate via en Kristo !

Honoré SEBUHORO NDARIHORANYE .



## Je l' nova jar'

Samkiel sekrete,  
mallaŭte, paŝete  
suriras la teron  
anĝel' de l' Sinjor',  
alvenis la tago.  
Ho, bonan matenon!  
Ni diru bonvenon!  
Alportu ĝi benon!  
Jubilu la kor'!

En Li la komenco!  
Per Lia potenco  
moviĝas la tuta  
stelar' super ni!  
Vi, patro, Vi stiru!  
Ja estas nenio  
sen vi, kara Dio!  
Al vi estu ĉio  
lasita de mi!

Verkita de Eduardo Mojriko  
(*Eduard Möricke*, 1804 – 1875).

Esperantigis: Manfredo Ratislavo  
(*Manfred Retzlaff*, \*04.11.1938)

je la 10.01.1982 laŭ la originala germanlingva teksto.